



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu numero : 6 FF. Unujara abono kun adresaro : 30 FF
 Ĝiri al la poŝtkonta numero : 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

DIALOGO KUN KONTRAŬ-ESPERANTISTA AMIKO

Mi, fiere : - Esperanto estos baldaŭ centjara.

Li : - Ne bombastu ! **La rezulto de** via centjara propagando ne estas **motivo por triumfumi**. Post centjaroj, kiom da esperantistoj vi estas ?

- Miavice mi demandas : Viaopinie, kiom da kristanoj estis en la roma imperio en la tempo de Trajano, cent jarojn post la komenco de la kristana erao ?
- Ne komparu nekompareblajn cirkonstancojn. En tiu tempo ne ekzistis la amasaj informrimedoj, kiujn oni nun disponas.
- Disponas ? Kiu disponas ? Ĉu ni esperantistoj ? Kiam vi vidis grandan nacilingvan ĵurnalon malfermi siajn kolumnojn al nia propagando ? Kiam vi vidis esperantistojn sur via televid-ekrano ?
- Nu, vi havas almenaŭ radio-elsendojn.
- Elsendojn en esperanto, kiuj interesas nur esperantistojn kaj ne tuŝas la grandan publikon. Ha ! se ni estus sufiĉe riĉaj por financi amasan reklamon, kiel iu lesivfabrika firmao, tiam nia produkto estus vaste pripetata.
- Se... se... Se mia onklino havus tion, kio mankas al ŝi, ŝi estus mia onklo. Vi ne estas riĉaj, tio estas fakto. Mankas al vi la mono, nervo de la milito kaj faktoro de venko. Tial vi ne venkos.
- La unuaj kristanoj...
- Ankoraŭ ili !

- La unuaj kristanoj estis malriĉaj. Tamen ili fine venkis la potencon religion de la roma ŝtato, kaj nun vidu, kiel riĉaj kaj potencaj estas Vatikano kaj aliaj kristanaj religioj.
- Vi ne venkos ! Vi estas jam venkitaj. Via lukto estas tiu de la argila poto kontraŭ fera poto. La fera poto estas la angla, kiu estas la vera lingvo internacia en nia moderna mondo. Vidu : via nepino, por sia biologia studado, estas devigata tralegi stakojn da anglalingvaj libroj, gazetoj, revuoj, raportoj. Same estas en ĉiu scienca fako.

Kion respondi ? Ne per idealismaj argumentoj mi konvinkus lin. Por tiaj realistoj validas nur unu rimedo : pruvi la movadon marŝante.

Ni marŝu kaj marŝu plu, senlace, kaj se ne sufiĉos unu jarcento, niaj posteuloj plu marŝadu tiel longe kiel necese, "nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante".

Kaj ni daŭre, pacience fosu nian sulkon.

VALO

LITERATURO KAJ PROPAGANDO

La esperanta literaturo estas grava afero. Ĝi pruvas la kulturan valoron de nia lingvo. Estas bonege kaj tre dezirinde, ke niaj plej talentaj aŭtoroj daŭre pliriĉigu ĝian trezoron. Sed por ni ĉiuj, ordinaraĵoj esperantistoj, estas banalaj kaj urĝaj taskoj. Al nia literaturo mankas malpli verkistoj ol legantoj. Por multigi la legantojn necesas :

1. Varbi novajn adeptojn,
2. Instrui tiujn novulojn.

Pri la instruado ni estas sufiĉe spertaj. Sed pri la varbado, nia propagando lamas sur malnovaj padoj kaj anhelas. Ni devas redoni al ĝi freŝan spirkapablon. Kiel ?

Ĉar ni ne estas riĉaj, ni ne povus financi reklamon per televido kiel lesivmarko. Ni nepre devas eltrovi malmulte kostajn rimedojn. Mi vidas du.

1. Bombardadi la nacilingvajn regionajn ĵurnalojn per proponataj artikoloj, eĉ se ili ofte ne publikigas ilin. Tiuj tekstoj ne konsistu el teoriaj argumentadoj, sed el koncizaj, sekaj informoj. Ĉiam sekvu la adreson de la loka grupo kaj indiko pri la tago, horo kaj loko, kie oni povas nin renkonti.
2. Presi grandkvante, naciskale, malgrandformatajn flugfoliojn kun tre mallonga teksto, ekzemple (nacilingve) :

ESPERANTO

La Lingvo Internacia

ANKAŬ VI povas ĝin lerni kaj praktiki (aŭ : uzi)

(fino sur la antaŭlasta paĝo)

LA POVO DE AMASKOMUNIKILOJ

Enkonduko de J.G. :

Jam ekzistas diversaj povoj : ekonomia, politika, jura..., sed fronte al ili naskiĝis kontraŭpovoj : la sindikatoj, la asocioj de konsumantaj, la defendo per advokatoj, ktp. Hodiaŭ nova povo pli kaj pli invadas la tutan vivon : tiu de la amaskomunikiloj : radio kaj ĉefe televido.

Jam dum la lasta jarcento la gazetaro ludis sufiĉe gravan rolon : famaj procesoj, psikologia preparado de la unua mondmilito, ktp. La naskiĝo de radio pligrandigis la povon de la komunikiloj. Oni povas memori la uzon, kiun faris el ĝi la nazia ministro pri propagando Goebbels por fanatikigi la amasojn.

La modernaj amaskomunikiloj influas nian kondutadon ofte nekonscie de ni, ĉar ili eniras hejmen en nia intima vivo. Ili gvidas la opiniojn, la elektojn. Ofte oni renkontas personojn, kiuj diras : "Tio estas vera, ĉar mi ĝin vidis ĉe televido!". La bildoj okulfrapas. La prezentanto povas ilin elekti laŭ la celo antaŭvidita. Vidu la raportojn, kiujn oni faras pri gravaj eventoj ; oni serĉas la sensaciajn novaĵojn, la "scoop", kiel oni diras anglalingve.

En la gazetaro, kiam oni ne konsentas pri la enhavo de artikolo, oni povas uzi la respondrajton. Ĉe radio aŭ televido oni povas nur skribi al la redaktoro de la elsendejo. Li respondas, se li bonvolas kaj nur kelkaj personoj skribas, la aliaj rezignas. La informado estas do unudirekta.

Kiam politikisto prezentas sin okaze de balotoj, pli grava estas la maniero kiel li aperas ĉe televido, ol la programo, kiun li proponas. Oni vidis tion dum la elekto de la usona prezidento Reagan aŭ dum la "duelo" inter Giscard d'Estaing kaj Mitterrand en Francio en 1981.

En la franca televido okazas ĉiusemajna elsendo pri literaturo. Tuj poste oni povas vidi la prezentitajn librojn ĉe la montrofenestroj de ĉiuj librovendejoj.

Ankaŭ pri la artistoj, nur la aŭdado ĉe radio aŭ vido ĉe televido "konsektras" ilin. Foje oni eĉ arte "fabrikas" ĉefakto-

ron. Oni valorigas eventojn kaj ignoras aliajn. Ĉu vi vidis ion pri esperanto ĉe televido ? Almenaŭ en Francio, neniam !

Kiamaniere eblas kontraŭ-

nia debato

stari tiun povon, kiu fariĝas danĝera por la homaj liberoj ? Ĉu multobligante la nombron de radioj aŭ televidĉenoj ? Sendube, pluraj sonoriloj estas preferinda afero ol nur unu, sed se oni povas sufiĉe facile akiri radio-elsendilon, necesas multe da mono por akiri televidĉenon. La monoposedantoj ne havas kiel ĉefan zorgon klerigi la homojn. Vidu tion okazantan en Italio !

Ĉu alkutimigi la uzantojn rigardi per kritika okulo tion, kion oni prezentas al ili ? Ekzemple, registrante per magneto-skopo elsendon, kiun oni poste pridiskutos ? Ĉu alia rimedo ?

Ĉiamaniere la esperantistoj, kies celo estas la komunikado inter la homoj en la tuta mondo, ne povas malinteresiĝi pri tiu problemo.

GAROLO :

Kiel dua ĉenero de la 23a ĉenletero, mi sendube plene konkordas kun la diroj de J.G., kaj multaj demandoj ne havas eblajn respondojn. Jes, daŭre, ekde kiam li ekzistas, la nepensanta homo estas manipolata de la amaskomunikiloj, ĉar ĝuste la nepensantaj homoj formas la acefalan popolamason, tiun blekantan ŝafaron, kiun kelkaj "lertuloj" ekspluatcele kondukas... Tio estas la trista konstato en la homa historio. La "bona" gvidado sugestita de J.G. en "apartaj" amaskomunikiloj same rezultos en manipulado, la solvo ne kuŝas en tiu punkto. Estas nur unu solvo, la homo, kiel individuo, devas mem pensi, mem konsciiĝi kaj malakcepti ĉiajn gvidadojn, ĉar gvidi estas apliki povon.

Ni daŭre kondamnas la modernajn amaskomunikilojn kiel radion, televidon, konsumisman reklamadon, sed ili ne estas pli danĝeraj ol la amaskomunikiloj kiel la Biblio kaj Korano, kiuj regis dum jarmiloj. Kompreneble pli ol 90 % el la homoj legis kaj ankoraŭ remaĉas la Biblion aŭ similan ; mi konfesas, ke mi persone ne sukcesis ĝin legi (kaj mi provis en diversaj lingvoj kaj okazoj), ĉar mia menso tute simple rifuzas la parabolojn, la envolvadon en mistiko, la absurdan fantazion, kaj akceptas nur faktojn kaj ideojn, kiuj povas esti kunligitaj al faktoj. Oni diras, ke tio estas bazo de scienco kaj racio, sed tio devigas la homon uzi la menson por atingi de memstareco, do ankaŭ por rifuzo de manipulado.

Mi kredas, ke la nura solvo por eviti la povon de la amaskomunikiloj estas tiu efektiva uzo de la intelekta kapablo, en natura homa edukado kaj instruigo preter la sociaj instrumentoj. Mi kredas, ke ĉiuj kosnciaj edukistoj, same kiel la pensantaj gepatroj, tiel povus helpi al la junaj homoj por ke ili ne iĝu aĉefaloj !

Jakelino : NE KULPIGU LA ILOJN !

Televido, radio kaj aliaj amaskomunikiloj estas nur iloj. Ĉu utilas kulpigi horloĝon, ĉar tro da tempo forflugis ! Televidilo povas, kiel ĉiuj iloj (krom eble armiloj) esti bona aŭ malbona ilo, depende, kiu ĝin uzas, kaj kiucele. La celo de Barlusconi estas manĝigi al mi spagetojn, kaj, inter la reklamoj montri al mi tian programon, ke mi restu rigardanta, kiam alvenos la venonta reklamo por spagetoj. La celo de Jaruzelski estas persvadi la polan popolon, ke la lando de la granda frato estas paradizo. Ŝajne Barlusconi sukcesas pli ol Jaruzelski. Estas vero, ke en epokoj, kiam la ĉefa fonto de scio pri la mondo estis la preĝeja katedro, oni fanatikigis popolojn per religioj. Hodiaŭ, oni plu fanatikigas homojn per religioj, kaj krome, en aliaj ŝtatoj, oni uzas ateismon kiel opion de la popolo. La misuzo de la ideologia povo estas kritikita jam en la Malnova Testamento, kaj ree en la Nova Testamento. Tion scius Garolo, se li apartenus al la tre eta minoritato de homoj, kiuj legis la Biblion, kaj ne al la granda plimulto de homoj, kiuj parolas pri libro, kiun ili ne konas. Bedaŭrinde, Garolo havas tian menson, ke li tute ne povas kompreni verkon skribitan en la kadro de alia kulturo, ol lia propra. Tial li perdas multajn trezorojn de la homaro. En la socio, pri kiu mi revas, amaskomunikiloj utilas por montri al homoj, kiel pensas aliaj homoj, proksimaj aŭ malproksimaj. Dum mi strebas al tiu socio, tiun celon mi provas iomete atingi per Esperanto, dialogante kun ĉiuj homoj, kiuj bonvolas dialogi kun mi sur la bazo de reciproka respekto kaj egalrajteco de la kundiskutantoj.

J.C. PICQUET : Ĉu disvolviĝo de amaskomunikiloj havos konsekvencojn en nia vivo ?

Mi volus aldoni perspektivojn al tiu ĉi debato. Ni ne devas forgesi, ke tiuj amaskomunikiloj estas novaj en la homa historio. En Francio, ekzemple, la unuaj radio-elsendoj okazis en 1921-22, kaj televido datumas de nov. 1935.

Do tiu noveco devas konvinki nin, ke ni estas ĉe la unuaj paŝoj de la disvolviĝo de tiuj komunikiloj. Pli kaj pli ili eniros nian vivon, anstataŭante aliajn (gazetojn, librojn...)

Imagu ! Jam en kelkaj landoj vi povas ricevi 15 aŭ 20 televidprogramojn, baldaŭ tio etendiĝos al aliaj landoj. Morgaŭ vi ricevos 30 programojn kaj poste 100, ktp. !

Kio interesas min, estas scii kiajn konsekvencojn tiu fenomeno havos sur la kampo de sociologio.

Ĝi certe havos konsekvencojn en niaj rilatoj kun la mondo. Jakelino forgesas diri, ke (jam hodiaŭ) morgaŭ, satelitoj sendos al ni televidprogramojn el la tuta mondo. Eta parto el ili estos faritaj surloke, respegulante okcidentan kulturon.

Mk LUHAN jam diris tion : modernaj komunikiloj alproksimigos nin de planeda vilaĝo. Tio signifas, ke pli kaj pli bildoj de l' tuta mondo venos tuje al ni. La tempo inter la evento (la fakto, kiu kaŭzis la eventon) kaj la ricevo (kaj la ricevanto) reduktiĝos ĝis kvazaŭ nulo.

Do, tri demandoj povas esti elmetitaj. La unua rilatas al amaso da bildoj. Ĉu ni scios elekti inter ĉiuj, elmeti hierarkion inter gravaj eventoj kaj bagateloj ? Tio estas kultura problemo ; niaj eduk-sistemoj certe devos elpensi edukadon tiusence.

La dua estas ligita al redukto de la tempo : ĉu ni havos sufiĉe da tempo por juĝi la eventon, analizi kaj finfine kompreni ĝin ? J.G. parolas pri gvidado de opinioj laŭ elekto kaj celo de tiuj, kiuj regas la bildojn. En la estonteco certe tiu vera problemo estiĝos alimaniere. Ĉar simple multobliĝo de la inform-fontoj metos nin en la pozicion havi eblecon juĝi, krucigante ĉiujn vidpunktojn. Sed ĉu ni havos tiun tempon ?

La tria estas ligita al stilo de rekta komunikado. J.G. parolas pri "scoop". Laŭ ĵurnalisma vidpunkto tio implicas prezentadon de nudaj faktoj sen analizo, la plej videblaj eventoj sen vido de iliaj kialoj. Tiu "scoop" estas kvazaŭ ne evitebla en situacio de rekta komunikado (sen filtriloj). Kiajn konsekvencojn nova stilo havos sur niaj pensmanieroj ? Ĉu niaj analiz-povoj estos detruitaj ?

Interese estas analizi kiamaniere problemo kiel malsato en la mondo povas eniri ĉi tiujn pridemandojn. Hodiaŭ paroli pri helpo al landoj, kie okazas malsato, ĉe amaskomunikiloj, ne sufiĉas. Oni devas organizi grandegajn eventojn ("Band Aid"...) en la tuta mondo por mobilizi homojn. Almenaŭ en okcidentaj landoj, amaskomunikiloj pli certe interesiĝas pri la maniero kiel tiu problemo estas kontraŭata ĉi tie, ol pri ĝiaj ĉefaj kaŭzoj en landoj trafitaĵ. Por esti pli klara : homo almontras la lunon kaj amaskomunikiloj rigardas la brakon.

Mi vidas aliajn konsekvencojn al venonta kreskiĝo de amaskomunikiloj : estas la lingva problemo. Rilate la ekonomian sistemon, la angla lingvo trovos terenon por disvolviĝi.

Ĉu rekta komunikado signifos rektan kompreneblecon ? Certe ne.

Esperantistoj trovos en ĉi tiu problemo novajn argumentojn por elmeti la demandon pri neceseco de internacia lingvo.

Jean-Claude :

Komuniki estas neceso, persone kaj socie. Pro tio estas la komunikiloj tiel potencaj. Tio certe povas esti danĝero.

Sed la povo ne estas unudirekta : grande ĝi dependas de la scivolemo, kritikemo de la aŭdanto. Utilas, ke ĉi-lastata havu plurajn informfontojn, oficialajn aŭ ne. La problemo kuŝas en la fidindeco de la informanto, eĉ se ĝi estas sincera kaj sendependa.

Laŭ mi, respondu al ĝi konstantaj, personaj kleriĝo kaj observemo.

Ĉar vole nevole ĉiu el ni estas informanto/aŭdanto.

Ĉernobyl kaj ties sekvoj ŝajnas tiuflanke ekzemplodona. Pli malfacilas mensogi al atenta aŭskultanto.

Suzanne :

J.G. trafe skizis la amaskomunikilan problemon. Ja, problemo.

La plejmulto ne estos pli objektivaj informata... tio ne estas la celado de tia abundeco, kies motivoj estas profitdono kaj potenco. La cerboŝtopado, pli grandskale, regos, almenaŭ por la plej granda parto de la homaro. Ŝajnas, ke la informoj de iaj komunikiloj (ekzemple, satelitoj) estos kapteblaj nur de malmultaj homoj, ĉar ilia aŭskultado estos multe kosta... verŝajne tio iom intence.

El tia amaskomunikado fontos malkonkordo. Mi ĵus aŭskultis radio-dissendon, kiu temis pri tiu ne leĝa, ne lojala kaptado (ĉu lojaleco rolas en tiaj medioj ?!), kvazaŭ spionado. Ne necesos plia spion-malsano al la homaro por pravigi, laŭdire de ĝiaj regantoj, interbuĉadon.

Ĵurnalisto diris tion : "Aŭskultanto de la informĵurnalo televida ne estas konvene informita ; por tio li konsultu la gazetaron." Ĉiel, la televid-profesiuloj en nia industria socio celas la senigecon de la individuo kaj ĝian unuformecon, por ke li iĝu perfekta laboristo, konsumanto, nepre necesa al la daŭrigo de la kapitalismo. La danĝero de la televido kuŝas en tiu instigo al la pasiveco, al tiu evitemo koncerne la personan iniciativon, postulatan de la realeco, multe pli ol en la stultaj aŭ funebrecaj programoj ; sed tia pasiveco estas nur iu aspekto de nia rezigno rilate la maŝinojn.

La risiko de iu intelekta submetiĝo estas fakte serioza ; ĝi naskus kulturajn regresojn. Konstanta uzado de la televido rivelas la multajn mizerojn de nia socio : apation, senkonscienco. La televido kompensas mankon, kiun multaj sentas sin nekapablaj alie elteni. Estas tiel facile sidiĝi kaj atendi la viciradon de la bildoj. La televido estas necesa parto de la stultigilaro, kies viktimoj ni estas. Oni konstatis, ke tiuj, kiuj havas televidilon, forlasas la legadon. Parenteze, la malfruo en la lernado, la malfacilo paroli, rimarkitaj ĉe multaj gelnantoj estas kaŭzataj de la aŭdovidado. La legado postulas mensajn intervenojn pli kompleksajn : elkriptigi la literojn kaj la vortojn, imagi... La leganto koncentras sin multe pli ol la telespektanto. La televido kaptas la imagon, sed ĝin ne liberigas. Bona libro povas samtempe stimuli la spiriton kaj ĝin liberigi.

Ja ne necesus tiom da komunikiloj. Unu sufiĉus, se ĝi lojale, objektivite informus, kaj ankaŭ... unu monda lingvo, ĉu ne ? Sed per esperanto, se la informoj ne estus objektivaj, la samo okazus kiel per la naciaj lingvoj : vidu kiel perfide iuj esperantanoj traktas la esperantistojn pri la centjara jubileo okazonta en Polio.

ĴANSEB : VIVU TELEMADIKO !


Amaskomunikiloj havas ja kontraŭpovon : Telemadikon, t.e. komunikadon per komputera terminalo tra la telefona reto. * Unue, ĝi ebligas koncentri informojn aŭ opiniojn de multaj personoj, trakti ilin kaj produkti sintezon el ili.

Tiuj informoj estas respondo al amaskomunikiloj. Tiurimede oni povas paroli televide kaj, samtempe, la elsendanto povas koni la reagojn de la spektantoj (sed ne la aliaj spektantoj povas necese tion fari !)

* Due, ĝi ebligas al homoj komuniki inter si, iam ajn kaj ie ajn, per elektronikaj mesaĝiloj. Tiu uzo de la telemadiko nun balbutas. Plej ofte telefonalkvoko aŭ letero estas pli taŭga. Sed tamen, kiam la afero pli bone funkcias, la homoj povos elekti siajn korespondantojn laŭ siaj emoj.

Estas nun mesaĝilo en Esperanto, sur "MINITEL", kiun la francoj povas uzi (36159177 + CYAN + 12 + ESPERANTO)* Ĉar tio postulas neniom da organizo, ĝi instigos la Esperantistojn labori kune, sen "kapelaj" (nek "ĉapelaj") kvereloj...

*(12 anstataŭ 9)



Nicole D. :

Tiu ĉi temo estas, almenaŭ en Francio, tre aktuala, por ne diri brula. Privatigo de la unua televida ĉeno okazigas informojn, diskutojn, reagojn, pripensojn interesajn, kiuj povas vere utili al konsciigo de la publiko pri la grava potenco de ĉiuj amaskomunikiloj aŭ almenaŭ rememorigi tion al ni, se necesas...

Neniam en la homa historio la "Tekniko" estis tiel ellaborita por ebligi ege rapidan koncentriĝon de multaj, diversaj informoj al la tuta mondo. Sed paradokse, la publiko estas pli ol iam ajn misinformata kaj manovrata, ĉar la regantoj de niaj modernaj socioj ne povis ne alproprigi al si la gravegan povon de la amaskomunikiloj.

Ĵurnalistoj, verkistoj skribas pri "ĉiutaga mensperforto al homamasoj" fare de potenculoj en la financmedio, kiu plimalpli kaŝe regas la eldonadon de la ĉefaj gazetoj el ĉiuj politikaj tendencoj. Neniu gazeto estus sendependa... (eĉ **Laŭte!** estus propagandilo de iaj fiuloj!... laŭdire...).

Ĉu ni ne forgesas, ke misinformado al la publiko estas vera "Arto", kiun oni instruas al politikistoj, entreprenistoj, agentoj de informoficejoj, arto kun precizaj reguloj (estas instruige ilin koni).

Sed ĉio, kion mi skribis ĝis nun, estas rememorigo de jam konataj faktoj. Mi volas aldoni pri la rolo de tiu, kiu ricevas la informojn aŭ misinformojn pere de televido aŭ de gazeto : intervenas ankaŭ la personeco, la travivaĵo de la "ricevilulo". Propraj kulturo, klereco, sentemo, "fantasmoj"... ĉio influas por percepti, kompreni mesaĝon. La samaj vortoj povas estigi malsamajn reagojn.

Tie sin lokas la "kontraŭpovo", en la inteligenteco de la homoj. Nun necesas alporti precizigojn.

Jam respondis J.G. kaj Ĵanseb : rompi la monopolojn per la plej tradiciaj kaj la plej modernaj rimedoj por ebligi kontaktojn inter la homoj (korespondado, vojaĝoj, uzi telemadikon, registri radiodissendon, eldoni gazeton... por ne nur lasi al profesiuloj la potencon de la "komunikado").

Do por esti pli respondeca antaŭ la amaskomunikiloj, necesas sin klerigi :

- Malmistifiki la teknikojn uzatajn (lerni verkadon, fotadon, filmadon (videofilmo estas inda je intereso), sin trejni paroli publike, ktp.)
- Analizi la diversajn rimedojn uzatajn, scii kiun ĉefan rolon oni postulas.

- Esti atentema al si mem por esti klarvida, kritikema sed ankaŭ tolerema.

- *Esti ĉiam scivolema, ne resti izolita...*

Unuvorte esti "malfermita", mense, kore, fizike, spirite, sed ne pasive.

Necesas ankaŭ reagi, diri sian malkontenton, rebati, postuli... ĉe redakcioj, verdire malofte ni havas tiun iniciativon ! Feliĉe ni havas ankoraŭ la liberan malŝalti televidon, radion, ne aĉeti gazetojn, kiam ili malplaĉas al ni... bojkoto, jen valoro rimedo por kontraŭstari povon de amaskomunikiloj !

ueli : MI MALMULTE AMASKOMUNIKILUMAS

Pro ĉiama trookupo, mi tre malofte legas la ĉiutagan mia-urban gazeton, kiun mi abonas. Mi ne posedas televidilon. Kiam mi estas hejme, mi foje aŭskultas radion sed prefere muzikon kaj malofte "gazetecajn" elsendojn. Mi estas abonanto de diversaj semajnaj, dusemajnaj, multe da monataj publikigaĵoj en la lingvoj germana, angla, esperanta. Parto de tiuj ĉiam alvenadantaj gazetoj temas pri komputiloj.

Komunikado kaj edukado apartenas hodiaŭ al la gravaj monopoloj de la ŝtato kaj de la multnaciaj entreprenoj. Lernejoj, universitatoj, malliberejoj kaj amaskomunikilejoj kunlaboras por ebligi al la nuna sistemo de la tutplaneda labormaŝino ĝian plufunkciadon. Se sufiĉe multe da homoj farus la salton al tute alia vivmaniero (mi proponas **bolo'bolo**, libron originale verkita far homo el Zŭrich en germana lingvo ; la aŭtoro nomiĝas **p.m.** kaj la libro ĝisdate disponeblas en franca-, rusa- kaj anglalingvaj tradukoj ; informoj pri la eldonejoj haveblas ĉe **ueli** kontraŭ irpk), post la salto, la amaskomunikiloj havos konsekvence alian funkcion.

Hodiaŭ, anstataŭ ol havi interŝanĝon, kontakton, reciprokan komunikadon, ni homoj disponas nur pri centrigita komunikado kaj informo. Estas la menciitaj centroj, kiuj decidas, kio por vi kaj mi estas sciinda, por ke ni ĉiuj kondutu laŭ sisteme. Ĉar kvazaŭ ne ekzistas informinterŝanĝo horizontala, necesas centrigita informado por malebligi la kolapson en si mem de sistemo baziĝanta sur specialismo kaj izolado.

Ĉar neniu plu havas la necesan liberan tempon por okupiĝi pri la okazaĵoj ĉirkaŭ si, estiĝas tuta inundo da informoj. Ni ekscias per radio, ke en nia propra strato okazis murdo. Anstataŭ aŭskulti rakontojn de vizitantoj, kiuj de malproksime alvojaĝis aŭ anstataŭ vojaĝi ni mem al fremdaj lokoj, ni estas devigataj je simulado de niaj travivaĵoj far la centrigitaj amaskomunikiloj. Ju malpli da tempo disponeblas por reala scio,

des pli da informoj ni volas, ni bezonas. La A.K.-oj tiom fariĝas anstataŭa mondo, ke ni ne plu kapablas vidi, percepti la veran, nin ĉirkaŭantan mondon.

Post la enkonduko de la sistemo **bolo'bolo**, la amasa gazetaro pereos unue. Ne nur ĉar ĝi nur tre malmulte da dudirekta interŝanĝo permesas (kun la leteroj al la redakcio kiel nura alibio), sed ankaŭ ĉar ĝi devigas je freneza malŝparo de ligno, de akvo kaj de energio.

Mi mem dum kelkaj sezonoj kunlaboris en loka radiostacio de urbo Bern. Tio estas laŭ mi ekzemplo de taŭga komunikilo. Ĝi havas limigitan povon, ankaŭ financan, kiu certigas, ke ĝi ne povas esti tro influriĉa, ĝi alparolas la homojn nur en difinita regiono kaj kapablas respondi al la lokaj deziroj kaj bezonoj.

Ĉar mi uzas komputilon por tajpi tiun ĉi ĉenleterokontribucion, mi disponas je alia ilo por komunikado pri la mondo kaj ties problemoj kun homoj kun la sama ŝatokupo, nome la amantoj de nia etkomputilo. (Mi havas Victor 9000 = Sirius 1, kiu NE estas kongrua al la fifama PC de la firmao IBM. Mi ŝatus rilati kun pli da geesperantistoj, kiuj uzas komputilon saman kiel la mia - se vi konas tiuspecajn homojn, bv. sciigu al mi ilian adreson). Inter ni amantoj de 1' Sirius 1 / Victor 9000, ni eldonas monatan gazeton sur diskedo. Jen la avantaĝoj : Estas facile reprodukti centpaĝan elektronikan gazeton, ĉar mi tutsimple kopias mian ekzempleron de unu diskedo al alia. La alian diskedon sendis al mi amiko, kiu ankaŭ volas legi la Novaĵdiskedon, do la kostoj de "presado" estas nur miaj kelkaj centonoj de ekuro por la elekto.

"KompRo"n vi konas, ĉu ne ? KOMPUtila ROno ĉe Germana Esperanto-Junularo. Ankaŭ ĝi ebligas komunikadon je malamaso inter gesamŝatokupiĝantoj.

Ĉar mi kunlaboras en solidargrupo loka en Bern kun la t.n. tria mondo, mi dum niaj renkontiĝoj ekscias pri multaj sciindaĵoj, eĉ se mi ne tralegis la gazetojn de la pasinta semajno.

Kiuj interesiĝas pri la sugestoj de **ueli**, tiuj povas skribi al li :

ueli haenni, Wyttenbachstr. 28, CH-3013 BERN, Svisio.

Ĵus eldonita : Fotoalbumo titolita "**Hispanio 36 - Bildoj el la socia revolucio**". Eblas mendi al :

PUBLICO, 145 rue Amelot, F 75011 PARIZO (tel: 33/148053408)

Publika prezo : 100 FF. Porasocia prezo (rabato 33%) : 67 FF



VALO

Vorto de Maljunulo

LA LUMOJ
DE LA
URBO

Jam la trian jaron nia urbeto estas nokte prilumata per tre efikaj lumigiloj. Sur la stratetoj kaj sur la granda vojo, kiu laŭlonge traboras la urbon, oni cirkulas nokte tiel facile kiel tage. Tio estas neneigebla progreso.

Tamen mi nostalgie memoras pri la noktoj de mia juneco. Ĝis tre malfrue ni promenadis, okupante la tutan larĝon de la vojo, ne ĝenate de danĝeraj veturiloj, en nigra mallumo aŭ en la blua helo de la luno. Levante la okulojn al la ĉiela volbo, ni vidis la Laktan Vojon kaj milojn da brilantaj astroj desegnantaj ĉiujn konstelaciojn de la norda duonsfero. Belega spektaklo, de kiu ni neniam laciĝis.

Nun, same kiel la taga sunhelo, la kruda artefarita lumo forviŝas tiun noktan belegon. En la ĉielo super la urbeto videblas nur kelkaj escepte brilaj steloj kaj planedoj, aŭ iafoje la rapide moviĝantaj lumsignaloj de pasanta aviadilo.

Progreso, ja sendube. Sed en ĝia nomo, kiom da atencoj al la natura belo !

Florako, julio 1986.

EN FLORAKO, JULIO 1986.

Kiel ĉiujare min akceptis mia somera restadejo kun siaj kutimaj ĉarmoj : malpeza aero favora al ripoziga dormo en la mirbelaj noktoj ; agrable malvarmeta akvo de la rivero, en kiun mi plonĝas kun la ĉiama plezuro ; ĉiumatene en preciza minuto, kiun necesas kapti, mi retrovas la kelkajn rokojn, kiuj rande kronas la ebenmontan supron, farbitajn de la sunleviĝo per belega koloro, kiel la Monto Roza vidata de Varezo. Sed nun, krom per la vido, tiuj karaj rokoj fariĝas por mi neatingeblaj. Miaj kruroj rifuzas supreniri ĝis ili tra la deklivoj, sur kiuj mi flaris timianon kaj lavendon, kaj trovis interesajn fosiliojn ; kaj se mi provas per ago de volo ilin trudi, tiam mia koro, tumulte batanta, devigas min halti. Rezignu, maljunulo, kaj nun kontentiĝu per la saŭdada* rememoro pri la forto kaj viglo de cia juneco. En j. 1905, kvinjara bubo, mi unuafoje

proksimiĝis al tiuj rokoj, helpate de mia sentima patrino. 25, 30 jarojn poste mi riskis min tie en danĝeraj akrobataĵoj. 80 jarojn poste mi ankoraŭ tien grimpis - tre probable lastafoje. Nu, laŭ mia-

landa proverbo, oni ne povas esti estinta kaj estanta. Mi jam notis jenan vorton de humoristo : la sola maniero por ne maljuniĝi estas morti juna. Por tio mi preterlasis ĉiujn okazojn, kiuj pasis apud mi. Plurfoje en mia longa vivo mi vidis de proksime la minacan rideton de la skeleta falĉisto. Ĉiufoje ĝi min domaĝis. Sendube la plimultaj el miaj samtempuloj samon spertis, eĉ se oni ne enkalkulas tiujn, kiuj travivis la abomenojn de milito.

Same vi gejunuloj, amikoj miaj, venke trapasos tiajn danĝerojn, kaj probable same maljuniĝos. Dum estas ankoraŭ tempo, ne preterlasu la okazojn por fari al vi belajn rememorojn, kiuj iam florkronos viajn blankajn harojn. Mi diras al vi, kiel Ronsardo al Helena :

Vivu, se vi min kredas, ne atendu ĝis morgaŭ ;
Kolektu jam hodiaŭ la rozojn de la vivo.

* saŭdado (el la portugala) : laŭ Grosjean-Maupin : "la amara plezuro, kiun oni trovas en sufero, la melankolia dolĉo de rememoroj kaj bedaŭroj".

TRI CENTJARAJ JUBILEOJ

En 1986 (fakte en 1984), en Francio, la laika publika lernejo estas centjara. Kaj en tiuj cent jaroj, neniam la religiaj lernejoj estis pli prosperaj ol nun.

En 1986 la unua de majo estis centafoje celebrata kiel festo de la laboristoj. Inter alie, en la "lando de socialismo", per grandioza militista parado sur la Ruĝa Placo. En tiu sama lando, kie Tolstoj skribis : "la deviga militservo, servuteco, kiu, laŭ grado de humiligo kaj abdiko de la homa volo, estas komparebla kun neniu el la antikvaj servutecoj"*.

En 1986 en Nov-Jorko, la statuo de Libero estas centjara. Oni festis ĝin per kolosa patriotisma manifestacio kaj supergranda demonstrado de militista ŝiparo.

Ĉu tiuj tri jubileaj celebradoj en la sama jaro ne havas simbolan signifon ?

* laŭ franca traduko.

1936. En Francio, post jaroj da senlaboreco, plimalaltigo de salajroj, ĉiaj socialaj regresoj, florado de reakciaj ligoj ; post dujara kovado, fine triumfis la popolfrento. Dank'al maldekstra plimulto en la parlamento, dank'al socialista ĉefministro, kaj precipe dank'al sia giganta klasbatala striko, la franca proletaro ricevis neniam antaŭe atingitajn konkerojn. La senlaboreco ĉesis, la salajroj estis plialtigitaj, la laborsemajno reduktita je 40 horoj en kvin tagoj, la laboristoj, unuafaje pagataj por dusemajna ferio, veturis al maro aŭ monto, kaj estis kreita ministerio pri sportoj kaj libertempoj.

Kvindek jarojn poste, regas neniam antaŭe spertita senlaboreco, kaj dekstra registaro kun dekstra parlamento preparas trajnon da reakciaj leĝoj, kiuj nuligos la socialajn progresojn de la kvin antaŭaj jaroj. Feliĉe ili ne kuraĝos atenci al kelkaj neforigeblaj konkeroj de la 1936a popolfrento.

NIGRA VIRINETO EN BLANKA ROBO

Lastan sabaton, en Florako, juna amiko mia, naskita en Dakaro kaj loĝanta en Ŭagadugu, nepo de protestanta misiisto, civile edziĝis al bela, tre nigrahaŭta, muzulmana afrikanino. Li estas nevo de alia pastoro, intima amiko mia (li nomas min onklo), kvankam li bone konas mian sintenon rilate religion. Tiu ĉi edziĝis al cevena hugenotino, tre fervora en sia kredo sed same tolerema. Ili havas kvar idojn. La unuenaskita vivas kun katolika eksedziniĝinta parizanino. La dua estas knabino, kiu vivis sinsekve kun muzulmano el Maroko, kun franca judo kaj nun kun alia judo, al kiu ŝi edziniĝis, post kiam ŝi naskis du filinojn. La tria knabo edziĝis kun tre bela eŭrazianino, filino de franca patro kaj de vjeta patrino. La lasta filino, post fiaska geedziĝo kun cevena protestanto, vivas nun kun alia protestanto, sed juddevena, de kiu ŝi havas filinon. Probable ankaŭ tiuj ĉi iam civile geedziĝos.

Tiu miksrasa kaj miksreligia familio kunvivas en plena harmonio, kies simpatian buntecon ĵus kompletigis la enkonduko de la ĉarma nigrulineto en blanka robo.

Tiu ĉi geedziĝo sen religia ceremonio estas la dua en tiu urbeto de tre kristana tradicio (la unua estis la mia, antaŭ 63 jaroj). Kaj ĝi estas la unua inter du malsamkoloraj personoj. La mia siatempe okazigis skandaletan. Ĉi tiu estis simpatie rigardata de la tuta urbanaro. Tio signas por mi simbolon de tre dezirinda evoluo en la moroj kaj mensostato. Florako, julio 1986

9-a funkcio : - POSESIVO NE REFLEKSIVO EN SUBJEKTA PREDIKATIVO, KIE SUBJEKTO KAJ PREDIKATIVO KONFUZIGAS.

Pro tio, ke refleksivo ne povas esti subjekto, ĝi ne estas uzebla en la propozicioj kun la kopulaj verboj esti aŭ ŝajni, kiam la subjekto estas persona pronomo, ĉar tiam la roloj de subjekto kaj predikativo interkonfuziĝas tiel, ke la predikativo povus esti konsiderata subjekto, kaj inverse.

Ekzemploj :

- Lia reĝo estas (aŭ ŝajnas) li. = Li estas (aŭ ŝajnas) lia reĝo. La homo ne plu devas timi la bestojn ; nun li estas lia sola predanto. = Lia sola predanto estas li.

Refleksivo uzebla.

Tamen, ĉar tiam konfuzo ne estas ebla, uzendas refleksivo en subjekta predikativo sen suplemento, kiam la kopula verbo estas farigi, kiam oni aldonas la adjektivon propra, aŭ kiam la subjekto ne estas persona pronomo, sed substantivo.

Ekzemploj :

- La homo farigis sia predanto, kaj tia, sia predanto, farigis neniu alia animalo. - Li estas (ŝajnas aŭ farigis) sia propra reĝo. - Ne ; kiu estas (ŝajnas aŭ farigis) sia propra reĝo estas Adolfo. - La homo estas (ŝajnas aŭ farigis) sia predanto, tiu, kiu predas sin. - "Sia predanto" estas nur la homo.

Subjekta predikativo kun suplemento genitiva.

Refleksivo ne uzebla.

En genitivaj suplementoj, eĉ en tiuj de subjekta predikativo, neniam oni povas uzi refleksivon.

Ekzemploj :

- Li estas la kuzo de lia edzino. = La kuzo de lia edzino estas li. (La edzina kuzo).

- Ŝi estis (aŭ ŝajnis) la sola kaj plena mastrino de ŝia bieno. = La sola mastrino de ŝia bieno estis (aŭ ŝajnis) ŝi. (La biena mastrino).

- Li estis la amoranto de lia mastrino. = La amoranto de lia mastrino estis li. (La mastrina amoranto).

Refleksivo uzebla.

Tamen, kaj ĉi-kaze "propra" ne estas decida, oni povas uzi refleksivon rilate al la subjekto, kiam la suplemento ne estas genitiva, kvalifika, ĉar tiam la roloj de subjekto kaj predikativo ne interkonfuziĝas pro inversigo de la ordo. Tiu ĉi kon-

diĉo troviĝas en du okazoj. En ambaŭ la sama prepozicio DE ne esprimas apartenon, ne estas genitiva, kaj ĝi estas ŝanĝebla per alia prepozicio, kies signifon ĝi havas (Pri aŭ al).

a) Kiam forestas la artikolo antaŭ la predikativo.

Ekzemploj :

- Li estas kuzo de sia edzino. = Kuzo de sia edzino estas li, ne lia amiko. ("De" = "pri" aŭ "al").

- Ŝi estas (aŭ ŝajnas) mastrino de (= pri) sia (propra) volo.

- Li ne estas plu mastro de si mem, nek responda pri siaj agoj. ("De" = "pri". Pli propre oni devus diri "mastro pri si mem").

b) Kiam la subjekto ne estas persona pronomo, sed substantivo.

Ekzemploj :

- Gastono, la urbestro, estas kuzo de sia edzino. = Kuzo de sia edzino estas Gastono, ne mi. ("De" = "rilate al" aŭ "pri". Diri "la kuzo", ne havus sencon.)

- Gustavo estas plene (la) mastro de sia bieno. = Mastro de sia bieno estas plene Gustavo. ("De" = "pri").

- Karlo estas (ŝajnas aŭ fariĝis) amoranto (aŭ amoristo) de sia mastrino. = (La) amoranto de sia mastrino (kiu amaras sian mastrinon) estas Karlo. ("De" = "al", esprimas la objekton de la ago, kaj estas klare ke same la subjekto estas Karlo.)

Refleksivo, ne uzebla.

Tamen post iaj substantivoj la suplemento kun de nur povas esti genitiva, kvalifika, kaj tial refleksivo ne estas uzebla.

Ekzemploj :

- Tiuj infanoj estos la iluzio de iliaj gepatroj. = La iluzio de iliaj gepatroj estos ili. (Gepatra iluzio).

- Ŝi estis la plena portreto de ŝia patro laŭ siaj beleco kaj honesteco. = La plena portreto de ŝia patro estis ŝi. (Patra portreto).

- Andreo estas la golulo de lia teamo. = La golulo de lia teamo estas li, Andreo. (Teama golulo).

Refleksivo, uzebla.

Ĉio dirita pri la subjekta predikativo rilatas al la suplementoj kun de, sed ne al aliaj prepozicioj. Oni povas diri, do, "la plena portreto, laŭ sia beleco" kaj "Andreo (aŭ li) estas (la) golulo en sia teamo. = En sia teamo, li, Andreo, estas (la) golulo. (Ne eblas konfuzo pri la subjekto).

Luis Mimó.

Por nia medito :

Fragmentoj

el leteroj de E. LANTI

"... Vere miriga estas via diro, ke en la nunaj cirkonstancoj ekzistas en Aŭstralio kelkaj homoj, kiuj ankoraŭ interesiĝas pri esp-o. Rilate al mia sperto ĉi-tiea, mi nun emas diri, ke nur malsaĝuloj povas kredi, ke iam la Zamenhofa elpensado sin trudos al la tuta mondo. Estas ja pli saĝe pensi, ke la Brit-Usona... "demokratio" finfine superregos la tutan mondon kaj sekve la angla lingvo fariĝos la mondlingvo. Por malebligi tion, mi nun intencas forlasi la esp-an aferon, kaj dediĉi min al la batalo, por atingi, ke mia patrio, Normandio, akiru sian suverenecon. Kaj tial ke la normanda dialekto ne povas nun konkuri kun la franca lingvo, mi volas, imite al la irlandanoj (Irlando nun sin nomas **Eire**), labori al la aŭtoritatigo de mia gepatra idiomo. Kaj tio memorigas min, ke, kiam malsaĝe mi eklernis esp-on, mi komence sentis preskaŭ naŭzon por tiu Zamenhofaĵo, tial ke ĝi enhavas la vorton ĉu. Por ke vi povu kompreni la kialon de tiu naŭza sento, necesas, ke vi eksciuj, ke kiam normandaj kamparanoj volas forpeli porkojn, tiam ili diras : "ĉu! ĉu!". Kaj tio memorigas min, ke en 1921, foje mi promenis en Dresden kun germana K-ino, kiu kutimis eldiri sian miron per tiu vorto. Preskaŭ ĉe la fino de ĉiuj miaj frazoj, ŝi diris : ĉu ? Kaj tial ke mi tiam estis relative nove bakita esp-isto, tio efikis sur min kvazaŭ ŝi volus forpeli min kiel porkon. Feliĉe ŝiaj okuloj rigardis al mi ameme kaj malhelpis, ke mi forkuru. Verdire, tiam mi ne ŝatis esperanton ; mi ne povis forigi la penson, ke ĝi estas ĉua, porkpensiga lingvaĉo. Sed poste okazis, ke kiam mi aŭdis : ĉu?, tiam mi ne plu pensis pri porkoj, sed pri la aminda Dresdenanino, kiun neniam plu mi revidis... Verŝajne ŝi edziniĝis, havis plurajn filojn, kiuj unue socialistiĝis, poste komunistiĝis kaj finfine hitleraniĝis. Nun mi esperas, ke tiu ĉua germanino povis sperti, ke la homoj, kiuj ne volas lerni esp-on, tial ke en ĝi oni diras: kiel vi fartas (to fart), posedas pli da bonaj mortigiloj ol Hitler.

Kaj kiam oni scias, ke en la lando, kie plej aŭdiĝas la vorto dankon! tio pensigas pri vira seksorgano (japane : dan = viro, kon = radiko), tiam forbloviĝas ĉia emo kredi, ke esp-o povus venki. Tial mi konsilas, ke vi eklernu la normandan dialekton, se vi estonte deziras korespondi kun mi. Sed, kompreneble, mi ne povas postuli, ke vi sukcesu en tiu lernado tre rapide kaj sekve mi konsentos akcepti viajn leterojn - fartecaj - dum relative longa tempo..."

(El letero al A.C.H., Aŭstralio, 25.5.43)

"... La **interna ideo** de Zamenhof, miaopinie, ne plu estas adekvata al nia epoko. Sed ni ne forgesu, ke tiu Zamenhofaĵo estis siatempe tre utila ; ĝi eĉ savis la esp-an aferon, kiam okazis la ido-skismo. Estu tute certa, ke mi ĝojas, kiam mi ekscias, ke esp-o progresas en la t.n. neŭtralaj rondoj, sed mi estas konvinkita, ke nia afero ne venkos per la neŭtraluloj, t.e. per la homoj, kiuj vidas en esp-o **nur lingvan aferon**. Kaj mi havas la konvinkon, ke ĉiuj politikistoj kaj laboristaj gvidistoj pli malpli konscie, **intuicie**, povas nur malsimpatii al la esp-a aŭ mondlingva movado. Tro longe mi devus skribi, por ke vi komprenu bone mian vidpunkton. Tamen mi diru, ke eĉ inter la SAT-anoj estis relative malmultaj, kiuj ĝuste komprenis la signifon de **sennacieca** organizo. U.E.A. ankaŭ estis sennacieca kaj la starigo de I.E.L. signis **reakcian tendencon**. Ĉu estas kelkaj UEA-anoj en B.A. ? Se jes, mi konsilas, ke vi okaze rilatu kun ili amike, t.e., ke vi montru simpatian al U.E.A. prefere ol al I.E.L. Sed, evidente, ne ĉiuj UEA-anoj ankaŭ komprenas la signifon de la **sennacieco** de sia organizo..."

(El letero al A.C.H., Aŭstralio, 30.6.1943)

"... Mi legis, antaŭ multaj jaroj, preskaŭ la tutan verkaron Anatol Frans, sed ne la libron, kiun vi mencias. Tio memorigas min, ke mi provis varbi al nia afero tiun famulon, kaj tiucele mi skribis al li. Sed respondo mi ne ricevis. Poste mi eksciis, ke jam de longe li estis dirinta stultaĵojn pri esp-o kaj artefaritaj lingvoj. Kiel vi sendube scias, mi varbis aliajn famulojn (Barbus, R. Rolan k.a.), kiuj eldiris belajn frazojn pri nia afero, sed ne ellernis esp-on kaj neniam verkis esp-e. Sekve, mi ne tre ĉagreniĝis pro mia fiasko rilate Anatol Frans. Sed mi konfesas al vi, ke lia stilo kaj verkmaniero estas el tiuj, kiujn mi plej ŝatas en la franclingva literaturo... En 1914 Anatol Frans volis volontuliĝi por kontraŭbatali la germanan militismon ; sed oni ne akceptis lin, tial ke li estis vere tro maljuna. Kaj tio memorigas min, ke tiam la agitfrazo estis : Venki la germanan militismon, por ke ĉi tiu milito estu la lasta. Mi ne havas la verkopapablon de A.F., sed almenaŭ mi ne lasis min trompi per la tiama agitado de la Alianculoj..."

(El letero al A.C.H., Aŭstralio, 13.7.1943)

"...Kara K-do, kortuŝite mi legis vian diron, ke via tuta vivo estas dediĉita al esp-o kaj SAT. Mi povas certigi vin, ke la plej bonmemoraj tagoj el mia vivo estas tiuj, kiujn mi plenis per SAT-laboro. Tamen vi eble scias, ke tio donis al mi nur insultojn kaj kalumniojn fare de la bolŝevistoj. Sed malgraŭ tio

mi ne sentas malamon por la sinceraj fanatikuloj el la Moskva eklezio - kaj nur malestimon al tiuj, kiuj kalumniis min, por eviti al si mem suspekton pri neortodokseco..."

(El letero al K-do D., Buenos-Aires, 16.8.1943)

"... La starigo de "Tutamerika Esp-o-Asocio ŝajnas al mi nepre malsaĝa, malracia. En Ameriko oni ĉefe parolas angle, hispane, portugale kaj france kaj sekve necesas 4 nacilingvaj propagandaparatoj. En mia instigo mi aludis nur pri Hispanlingva Asocio, tial ke la propagandiloj kaj instruiloj hispanlingvaj taŭgas same en Argentino, kiel en Hispanio, Meksikio, k.c. hispanlingvaj patrioj. En Francio, kiam mi iniciatis la starigon de la "Fédération Esp. Ouvrière", ĝi ne estis franca organizo sed **franclingva** kaj ni varbis anojn en Belgio kaj Svisio..."

(El letero al K-do D., Buenos-Aires, 12.5.1944)

"... En antaŭa letero mi jam konigis al vi mian opinion pri starigo de Amerika Asocio Esperanta, sed rediros, ke tio ŝajnas al mi sensencaĵo. Esperanto estas **tutmonda** afero, kiam oni ellernis ĝin. Sed por lerni la Zamenhofan lingvon **nacilingvaj** lerniloj estas utilaj ; same **nacilingvaj** propagandiloj estas necesaj por konigi nian aferon. Tial mi opinias, ke nur **nacilingvaj** kaj **esperantlingvaj** aparatoj estas trafe laŭcelaj : la unuaj por diskonigi esp-on en la koncernaj nacilingvaj teritorioj kaj la duaj por utiligi praktike nian lingvon laŭ **tutmonda** skalo. Ekzemple, Argentina Esperantisto ŝajnas al mi nelaŭcela organo ; devus esti **Hispanlingva Esperantisto**..."

(El letero al la sama, 8.6.1944)

"... Eble interesos vin ekscii, ke mi nun faras novan eksperimenton cele al tio, ke miaj haroj reakiru la kaŝtanan koloron, kiun ili havis ĝia mia 40-45-a jareco. Kaj ŝajnas ke la provo sukcesos. Mi komencis ĝin antaŭ 15 tagoj, kaj nun mia hararo, kiu estis tute blanka, jam aspektas grize. Preskaŭ la duono de miaj haroj nun fakte reakiris la kaŝtanan koloron. La eksperimento konsistas en jeno : 4, 5 fojojn ĉiutage mi starigas min sur la kapo kaj manoj kaj kun la piedoj al la ĉielo. En tia pozicio mi nun povas resti ĝis 8-10 minutoj, kaj dume praktikadi la ritman spiradon profundan de la joganoj... Bedaŭrinde, mi ne sukcesas rejuniĝi spirite, mense ; mia skeptiko estas nekuracebla.(...) Fakte, mi komencis tiun eksperimenton nur pro scivolemo kaj ne pro deziro rejuniĝi. Tre ofte la vivo ŝajnas al mi pli inda je mal- ol longigo..."

(El letero al E., Sydney, Aŭstralio, 17.12.1944)

"... Via rakonto pri S-ro T. interesis min kaj ĉe tia okazo mi konfesu al vi, ke en la restariĝonta SAT mi volonte konsentus pri la ekzisto de teozofia, spiritista, framasona, kvakera - eĉ katolika frakcioj, kun la samaj rajtoj kiel antaŭmilitaj ĝuis la anarkista, bolŝevista, socialista, sennaciista ktp. frakcioj. Komprenoble, kun la kondiĉo, ke tiuj frakcioj konsentus, ke ilia aparta kredo ne estu de ĉiuj SAT-anoj akceptita kiel nediskutebla dogmo. For la dogmojn ! devas esti la devizo de nia organizo. Sed la sperto montris, ke ateistoj povas esti dogmanoj. Mi mem ne kredas je dio, sed ne neas ĝian ekziston. **Aseri kaj nei** estas signo je kredo ; sekve, mi ne estas ateisto nek deisto. La fakto, ke en Ĉilio katoliko montriĝis pli larĝmensa ol bolŝevisto pruvis al mi, ke la etiketoj tre ofte erarigas pri la enhavo de ujo. Katolikismo kaj sennaciismo estas samsignifaj. Sed komprenoble la katolikaj SAT-anoj devus konsenti al tio, ke en la SAT-organoj oni rajtu kritiki dece, ĝentile, ne insulte, la katolikan dogmon. Sed, inter ni dirite, t.e. konfidence, mi opinias, ke la sennaciistoj devas kvazaŭ konsistigi la animon de SAT. La sennaciismo ja estas la sistemigita Interna Ideo Zamenhofa. Pri tio vi bv. legi, aŭ relegi, la sesdekan leteron kun la subtitolo **Paraleloj**. Kiel argumenton, ke oni devas esti tolerema, mi aldonas du eltranĉojn per kiuj vi povos konstati, ke eĉ en la scienca kampo ne eblas akiri definitivajn, firman opinion. Kaj tio ŝajnas al mi tute normala, tial ke : 1) la mondo estas en konstanta evoluo, aliĝo ; 2) ne eblas, ke du homoj faru la saman eksperimenton samtempe kaj samloke ; 3) la eksperimentiloj influas iomete sur la eksperimentaĵon..."

(El letero al K-do D., Buenos-Aires, 31.3.1945)

Noto de la red. de "Laŭte!" : Tiu ĉi ekstrakto finas la "felietonan" publikigadon de ankoraŭ ne eldonitaj leteroj kaj tekstoj de LANTI, el la jaroj 1938/45, komencitan en la n-ro 59 (marto/aprilo 1985). Ni esperu, ke iam estos reeldonita la nun elĉerpita libro "**Leteroj de E. Lanti**", kiu arigis leterojn kolektitajn ĝis 1937.

Dume, kiuj interesigis pri la malbone konataj tekstoj de la neortodoksa SAT-pioniro, tiuj povas ĉerpi multajn liajn "cerbajn sekreciojn" el la tri volumoj publikigitaj de SAT-Broŝurservo :

"El Verkoj de E. LANTI" (1,2,3)

(Ĉiu volumo : 20 FF)

kaj el la reeldonita "**Vortoj de Kamarado E. Lanti**" (18 FF)

GBEGLO Koffi (Togo) :

TRANKVILIGA DULINGVISMO

Ĉiu estulo ekde sia naskiĝo devas komuniki kun siaj ĉirkaŭuloj. Tial infanoj ploras por sciigi pri sia malkontento. Kio okazus al tiuj infanoj pri sia komunikado laŭmezure kiel ili kreskas ?

En la komenco, ĉiu regu sian gepatran lingvon. Per tiu lingvo oni povas komuniki kun samgentanoj. Ofte gepatra lingvo estas la nacia lingvo : tiel, samkiel oni regas la gepatran lingvon, oni praktikas la nacian.

En multaj landoj, ĉiu gento havas propran lingvon, tial ekzistas multaj lingvoj en ĉi tiuj landoj, kie ĉiu regiono havas sian lingvon. Do, paroli pri unu nacia lingvo en tiaj landoj estas malfacile, ĉar kiel iuj gentoj povos facile regi la lingvon de aliaj gentoj se iu elekto okazos ? Tiel komunikado inter samregionanoj estas facila, sed malfacila kaj eĉ neebla estas tiu inter malsamregionanoj.

En ekskolonioj, la importita lingvo, la lingvo de la koloniistoj ege helpas al la komunikado. Koloniistoj malfermis lernejojn kaj instruis sian lingvon. La importita lingvo tiamaniere fariĝis la oficiala lingvo de la ekskolonioj, kio permesas al instruistoj samlandaj komuniki inter si, kaj eĉ kun eksterlandanoj lernintaj la saman lingvon. Sed kion faru france instruistoj, kiuj intencas komuniki kun angle instruistoj ? Problemo aperas, kaj tiu problemo ĝenas eĉ la koloniistojn mem en ilia kontinento.

En Eŭropo ĉiu lando havas sian nacian lingvon, kiu ebligas al samlandanoj komuniki facile inter si. Sed ĉiufoje kiam iu landano devas komuniki kun alilandano, necesas, ke ĉiu praktiku ambaŭ lingvojn, aŭ almenaŭ unu praktiku ambaŭ lingvojn. Tiel ia plurlingvismo stariĝas, ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta mondo. Kiel oni povas regi tiun plurlingvismon dum ekzistas multnombraj lingvoj ? Kia cerbumaĵo ! Tiam aperis ideo pri internacia lingvo.

Kiam oni parolas pri internacia lingvo, kiun oni devas elekti ? Se oni elektos la lingvon de iu lando, ĝiaj anoj sin konsideros kiel superulojn. Tiu konfuzo komplikas la elekton de internacia lingvo. Oni proponis la francan aŭ/kaj la anglan, ktp. Sed nuntempe oni diras, ke la fakte internacia lingvo estas la angla. Ho, kiel flatinde estas ! Problemo pri internacia lingvo estas kompleksa. Necesas trovi iun lingvon apartenantan al neniun lando kaj kiu estu facile lernebla kaj prak-

tikebla. Iam, kiam tia lingvo povos ekzisti, tiam internacia senpera komunikado estos ebla. Internaciaj organizoj malŝparas multegajn sumojn por traduki tekstojn de iu(j) lingvo(j) en alia(j)n. Se lingvo internacia, neŭtrala, ekzistas, ĉiam tiuj ĉi organizoj povas uzi tiujn sumojn por helpi samhomojn turmentatajn de malsato kaj malamo.

Estis en 1887, ke lingvo zamenhofa naskiĝis. Ĝi tute havas ĉiujn karakterizaĵojn de internacieco : facile lernebla, logika, neŭtrala, k.c. Tiam la defio estis lanĉita al ĉiuj praktiki tiun lingvon. Se ĉiuj sukcesos regi tiun lingvon, la cerbumiga plurlingvismo neniĝos por cedi al dulingvismo. Ĉiuj parolu ekde sia infanaĝo sian gepatran lingvon kaj ankaŭ la internacian. Jes, tiu dulingvismo taŭgas por la tuta homaro pro la fakto, ke ĝi formetas neniun nacian lingvon, sed helpas ĉiun landon konservi siajn kutimojn kaj morojn, kaj helpas ĉiujn landojn koni unu la alian. Sed ĉu tiu dulingvismo povas taŭgi ankaŭ por ekskolonioj ?

Ekskolonianoj estas jam dulingvanoj : ili praktikas sian gepatran lingvon kaj la importitan. Do tiuj landoj estus trilingvaj, sekve praktikus tiel skribe kiel parole la tri lingvojn. En multaj tiaj landoj, la gepatra lingvo ne estas skribebla aŭ nur parte, kio instigas tiujn landanojn al dulingvismo, la importita lingvo estas kvazaŭ ilia nacia lingvo. La landoj, kies lingvon la ekskolonioj praktikas, kunhelpas la plenan posedon de sia lingvo far la ekskolonianoj. Se la ekskolonianoj devos esti dulingvanoj, ili praktikos la lingvon de la koloniismo, do estos dulingvanoj kiel la koloniistoj mem. Samkiel por la lingvo koloniisma, ekskoloniistoj devas agi, ke ilia dulingvismo superregu iliajn ekskoloniojn, do ili devas kontribui al la disvastigo de la internacia lingvo en la ekskolonioj. Iuj landoj jam komencis per siaj E-asocioj starigi veran E-movadon en siaj ekskolonioj ; kial la aliaj landoj devas sin malhelpi tion fari ? Tio estas la sola agmaniero, kiu povas signifi al la ekskolonioj, ke ekskoloniistoj nun luktas por la starigo de mondpaco pere de trankviliga dulingvismo. Britia E-Asocio jam tion faras en iuj landoj afrikaj, la aliaj tiaj landoj estas petataj imiti Brition.

Dulingvismo necesas, kaj tio enhavas la nacian kaj internacian lingvojn. Iam, kiam tiu dulingvismo estos efektive starigita, tiam la tuta homaro sin komprenos kaj ne estos plu malamo. Ha! kiel trankviliga tiu dulingvismo estas ! Ĉiu estulo libere parolos kun alia apartenanta al iu ajn lando.

Sukceson al la internacia lingvo !

"Beauvoir" (Bovuar) mortis. Ne penseble. Ĉiuj virinoj en Francio kaj alie - t.e., ĉiuj kiuj volas sin respondecas virinoj - iel perdis spiritan patrinon, pli aĝan fratinon, kvankam ne tre multaj inter ili fakte legis ŝiajn verkojn. Ekzemple mi, kiu ĝis nun legis nur "Mémoires d'un jeune fille rangée" (Memoraĵoj de saĝa junulino), kaj "L'invitée" (La invititino). Kaj tamen, ĉiujn ideojn ŝiajn mi jam konas, se ne rekte de ŝi, almenaŭ de tiuj virinoj - kaj ankaŭ kelkaj viroj - kaj de la ĝenerala movado, kiuj disvastigas modernajn ideojn pri rilatoj inter viro kaj virino, kaj pri tiu demando : kio estas "viro" aŭ "virino" ? Tion mi konstatis, kiel la aliaj ĉeestantl-ĉefe - in-joj, dum prezento de filmita intervjuo de S. de Beauvoir kun usona virino (el iu universitato), kiu ŝin demandadis pri ĉiuj ĉefaj punktoj de ŝia pensaro.

Frapas min plej forte la kuraĝo, la firmeco de tiu penso. Ŝi pensas per si mem, ne hezitas refuti teoriojn, kun kiuj ŝi ne konsentas, aŭ korekti misinterpretojn de deklaroj ŝiaj.

Mi, persone, ne pri ĉio plenkonsentas kun ŝi. Ekzemple, kiam ŝi diras, ke plej nocas la t.n. "nuklea" familio. Mi ĝin kredas tamen tre bona, almenaŭ dum la unuaj jaroj de l' infano, kiu bezonas - eĉ se iluzian kaj provizoran - sekurecon. Se la "nuklea" familio donas al ĝi kontentigan sekuresenton, kial ĝin rifuzi ? Sed, verŝajne, ŝi kritikas tiun negativan koncepton de familio fermata sur si mem, senrilata al eksteraj influoj. Se temas pri tio, mi ja plenkonsentas kun ŝi.

Pri aborto : nun, mi ĝin malaprobas, sed bone memoras ke iam mi, senpripense, vidis en ĝi la nuran solvon kontraŭ neplanita gravediĝo. Ŝian lukton "por aborto" oni preferinde, laŭ mi, prezentu "pri aborto". Ĉar temis, entute, pri rivelado, senmaskigo, de tiu krima socia premo, kiu faris ke virinoj (ofte junulinoj) ajne abortis, do, kaŝe suferis tion, kion hipokrita socio ne volis agnoski. Post la prezento de la filmo, iu cetere reinsistis, ke aborto estu nur plej lasta solvo, se kontraŭkoncipilo ne efikis - kaj ke, ĉiukaze, aborto estas, por virino, terura sperto.

Tion ĉi, eble, mi plej ŝatis en la respondoj de S. de B. : ŝi diras sian opinion, sed lasas al ĉiu virino la rajton - pli ĝuste, la devon - decidi mem pri sia estmaniero, pri sia virina digneco - aŭ digniĝo -, fronte al, paralele al, la viraro. Ekzisti kaj pensi per si mem, jen la moto. Akiri liberecon, t.e. respondecon. Sed, ŝi substrekas, esti "libera" ne signifas esti ĉiam "nedependa" rilate iun ajn : normalas, laŭ ŝi, foje sin senti ligita al homo(j), aparte kara(j). Libereco, do, ne sinonimas afekcian neriĉecon nek sekecon.

KOSMILOGIO

Kosmiologio estas tute nova scienca ideo kaj, ĉar ĉi artikolo celas ke ankaŭ simpla leganto ne nur povas legi, sed same povas kompreni la signifon de la enhavo, sekve konsciigi pri la valoro por si, estas necese, ke post ĉiu nova vorto aŭ speciala signifo de iu vorto sekvas klarigo.

La vorto "KOSMIO" ne troviĝas en vortaro. Kosmio estas plurdimensia kosmo. Krom pri materio kaj tempo ĝi temas pri la spirita potenco. Linio havas nur unu dimension ; surfaco havas du (longo kaj larĝo) ; solido havas tri (longo, larĝo kaj alto, do enhavo) ; la universo havas kvar (por mezuri distancojn oni bezonas tempon = daŭron pro la moviĝado) ; Kosmio estas transcenda. Transcendi (tr) = transpasi iun regionon de la sciado.

Iu povas scii multon, sed ne ĉion. Sur nia planedo ni kune scias multon, sed ankaŭ ne ĉion. Ekzistas aferoj nesciataj. Foje iu trovas ion novan ; ion, kio ĝis nun ne estis konata. Per tiu invento la regiono de ties sciado estas transcendita.

Kvankam "transcenda" estas filozofia vorto, ĉiu simpla onio povas trovi novaĵon kaj per tio transpasi la regionon de sia sciado. Iu inventis la vorton "KOSMIO", kiel la spiritan fonton. Ne temas pri iu religio aŭ ideologio, sed pri la energia potenco, kio nedisigebla troviĝas en ĉio materia.

Kiam ni kosmologie uzas la vorton SPIRITO, tiam ni ne pensu pri individuo, sed pri totala potenco. El tiu potenco ĉio ekzistanta pruntas la forton por sia ekzisto.

Ankaŭ ni dupieduloj vivas dank'al kosmio per prunto el ĝia fonto. El kosmia vidpunkto nia personeco estas ligita al tiu fonto. Dum ni vivas, ni ĉerpas el tiu fonto per manĝoj kaj trinkoj, sed ankaŭ rekte laŭ spiritaj vojoj, pri kies ekzisto ni ankoraŭ malmulte scias. Ne estas honto, kiam ni konfesas, ke niaj kapabloj estas limigitaj. Ekzemple paranormalaj homoj estas maloftaj. Eĉ la vorto "paranormala" ne estas trovebla en P.I.V., sed en la hodiaŭo tiu psikologia fenomeno estas konata afero. En la hodiaŭo ekzistas klarvidaj homoj, same kiel en pasintaj epokoj.

Klarigo pri la vorto "hodiaŭo" : laŭ PIV = la tago mem - ni ĝuu la hodiaŭon. Tute prave, ĉar neblas ĝui morgaŭon. Hodiaŭo estas eterna tago ; tuj post la finiĝo la nova tago nomiĝas "hodiaŭo". Por kompreni Kosmiologion estis necese, ke mi konsentis pri la klarigo de la vorto "hodiaŭo". Mi vivas en mia hodiaŭo ; homoj en aliaj kulturoj vivas en sia hodiaŭo ;

homoj en pasintaj kulturoj vivis en la tiamaj hodiaŭoj. Kulturo estas precipe spirita, tio signifas, ke koncernas kosmion.

Laŭte estas kultura bulteno. Sur paĝo de L!67 VALO prave instigas, ke ĝi estu la organo de la nova tutmonda kulturo, kaj li petis la helpon de orientaziaj, afrikaj kaj amerindianaj esperantistoj, ke ili alportu en esperanton novan sangon el ties originalaj kulturoj. Ili helpu nin fari el ĝi tutmondan esprimilon. Prava la instigo ; la peto estas pridiskutenda. Ni (inkluzive ili) faru el ĝi tutmondan esprimilon. La kosmia spirito postulas, ke ni ŝanĝu nian pensmanieron per nova paradigmo. Inter esperantistoj ni ne parolu pri ILI.

(19860709- 4K20) **iea iu**

p.s. Mi petegas, ke oni NE traduku ĉi artikolon. Kiu ne kapablas legi esperanton, tiu ne indas esti informata pri Kosmiologio. **iea iu.**

SED KIAM VI REVENOS ?

*Hodiaŭ do kaj morgaŭ
mi restos ja ĉe vi,
sed en la tago tria,
jen devos migri mi.*

*- Sed kiam vi revenos,
plejkoramato, min,
por pluki ruĝajn rozojn,
por ĝu' de friska vin' ?*

*- Se neĝos ruĝajn rozojn,
se pluvos friska vin',
ĝis tiu tag' atendu,
plejkoramata min.*

*Ŝi iris en ĝardenon,
la patran, sternis sin.
Ŝi songis jen iome
pri pluv' de friska vin'.*

*Ŝi domon al si plektis
el trifoli-amas',
ĉielen vidojn rektis
al ebla rozneĝpas'.*

*Ŝi kovris per vaksflavo
kaj per lilioj ĝin,
por ŝi kaŝej' de savo,
se pluvos friska vin'.*

*Kaj post la finkonstruo
ŝi trinkis de la vin'
kun rozbuked' en mano
endormen igis sin.*

*La knabo venis hejmen
al la ĝarden' je l'fin'.
Li portis rozbukedon
kaj glason kun la vin'.*

*Li tie falpuŝigis
je stranga verdo sin.
Jen ruĝaj rozoj neĝis.
Jen pluvis friska vin'.*

El la popolkantkolekto
"Des Knaben Wunderhorn"
(La mirkorniko de la knabo)
elgermanigis : **Hagen Hirte.**



MALLAŬTE
aŭ
VORTOJ DE MALKURAĜULO

Jam pasis la 10a nokte kaj en la kazerno estas nenio farebla krom pretiĝi por enlitiĝi kaj dormi. Tamen pri la somera varmo ĉi-tiea (Seviljo, sude de Hispanio) tiu horo estas tre oportuna por sin duŝi, kaj ĝuste tion mi faris. Kiel kutime mia ŝercema spirito revigliĝis post tiu freŝiga rito. Ĝi, tagon post tago, igas min elteni ĉi tiun enuigan militecan vivon.

Ne pensu ke la kor' gajas
ĉar mi kantadaŝ kun forto.
Mi similas al birdetoj ;
se mi ne kantas, tuj mortos.

Jen veksignalo, vespersignalo,
jen denova formaci'.
Eĉ la ĉurovoj enuas
pro tiu arma viv'.

Tiu populara kanto en la soldataro akompanis miajn paŝojn de la duŝejo ĝis mia dormoĉambro, kie, kiel kutime - ĉio ĉi tie okazas pro kaj per kutimo -, estis mia kunulo. Li aŭde mian "feliĉon" akceptis min per la kutimaj vortoj :

- Kio estas al vi, ĉampiono ? La "bufo"(*) tuj dormos, ĉu ne ?
- Jes, tamen mi devus skribi...
- Ĉu ?
- Jes, leteron. Okazas ke mi ne scias kion diri.

Mia amiko verŝajne fajfis pri mia afero ; tamen mi daŭrigis:
- Temas pri nederlanda armerifuzanto en malliberejo.
- Ĉu ? Tre interese. Kiel vi scias pri li ?
- Per esperanta revuo.

- Ha! Ankaŭ li scias esperanton... Strange ke en Nederlando oni malliberigas armerifuzanton. Kompreneble vi esprimu solidaron al li.

- Jes, tion mi intencas, sed estas malfacile, ĉar ja mi mem armeservas.

- Ĉu gravas ?

- Sendube ! Ĉar mi konsideras lin prava. Atentu : li pro sia kristana sinteno rifuzas armeon kaj malŝatas ĉi tiun militeman

kaj armeindustrian socion. Kaj kio mi estas ? Ĉiama defendanto de la industria civilizacio, ĉiama serĉanto de ĝiaj bonaĵoj, ĉiama pardonanto kaj forgesanto de ĝiaj fiaj trouzoj. Ĉu vi ne komprenas ? Kion mi povas diri al li, se mi ne kuraĝas ataki ĉi socion, se mi ĉiam serĉas la malplej malbonan vojon ene de ĝi, se mi estas socidemokrato, se mi preferas reformon al ŝanĝo, se mi voĉdonis jese en la pri-NATO-a referendumo(**)...?

- Kion ?! Ĉu vi voĉdonis por-NATO-e ?!

- Jes ja... Al vi mi ekspliku...

- Ne, ne. Pli bone ekdormu, bufo, ekdormu. Kaj plej bone ne skribu al armerifuzanto, bufo !

NOTOJ : (*) La malnovaj soldatoj nomas la rekrutojn bufoj.
(**) Temas pri la pri-NATO-a referendumo okazinta en Hispanio pasintan marton.

19860629 (1 K 20)

Pako la tria

kaj nun armeservanta.

KIOM AJN LERNEBLAS

En mia naivo mi imagis emerito nian redaktoron sinjoron Kribo, aliel li ne havas tiom da tempo legi, elekti, redakti, tajpi, komposti, presi, bindi, tranĉi, balai, enkovertigi, slipumi, ekspedi, ricevi kaj kontumi. Post lego de "Vojaĝo tra Esperantujo dum 1985" de Paŭlo ("laŭte" 64) mi ridegis je mia stulto - mezuri alies marŝon per mia paŝo. Kribo ne estas emerito, sed intense funkcianta fervoja staciestro, kies taskoj ĉiam devas fariĝi ekzakte. Li kontribuas "laŭte"n nur permesate per siaj ceteraj horoj. Videble, en Eŭropo estas multaj esperantistoj diligentaj/abundedonantaj kiel Kribo, ĝuste per kies propraj monsubteno kaj vigleco fartas sane la ĉefaj Esperanto-organizoj kaj eliras loge la gravaj Esperanto-verkaĵoj en la mondo.

Ĉe mia tero troveblas malfacile tiaj diligentuloj/abunde-produktantoj. Sub la "socialisma principo" egaleco oni ellernas kaj kutimiĝas labori nek diligente nek maldiligente, sed netroveble "kurante" kiel Kribo priskribita de Paŭlo en tiu vojaĝnoto. Tamen kiel esperantisto mi forte volas kapabli "kurante" pri Esperanto. Malgraŭ mia peno, restas al mi ĉiam malespero, ĉar post ĉiutage neforigeblaj vojiro (1 horo), vivtenlaboro (8 h.), kuir/manĝo (4 h.), lavo/purigo (1 h.), alies ĝeno (1 h.) lasiĝas al mi nur malmulte da tempo kaj energio por mia hobia Esperanto.

En realo ne eblas la sama frukto ĉe ĉinaj esperantistoj por malalta enspezo, peza vivĝenaĵo kaj, ankaŭ neforigende, certe malfacila mastrado de Esperanto, tamen ĉu tiaj diligenteo kaj rendimento ne lernindas de ni kaj ankaŭ de aliaj esperantistoj de la tria mondo ? Do, laŭ nia propra kondiĉo, kiom ajn ni kapablas delerni, tion lernu ! Ne kapablas arbiĝon, estu herb-igō, kiu la teron ankaŭ verdigas.

S. Suk (Ĉinio)

K I A N BIENON NI PRENU ?

La prilingvaj konsilojn de Valo, kiuj aperis en la kajero n-ro 67 de "laŭte!" ni ĉiuj povas nur aprobi. Spite la idealan teorion ni tamen rimarku, ke esperanto dekomence submetiĝis en iuj partoj al eŭroplingvaj kutimoj. Tiel estiĝis certaj idiotismoj ; multaj el tiuj t.n. "esperantismoj" daŭre vivadas en nia lingvo.

La de Valo aludita vorta eraro de francoj kaj germanoj probable originas el la fakto, ke en ambaŭ lingvoj franca kaj germana ekzistas speciala vorteto (si, doch) por jese respondi al nea demando. Ni plie konstatas, ke al la nea demando : ĉu vi ne venos ? same nea respondo logike (kaj laŭ la ruslingva uzado) devus esti : jes (t.e. : jes vi pravos, mi ne venos) ; malgraŭ tio la okcidentlingvaj esperantistoj kutimas respondi : ne (t.e. : ne, mi ne venos). Tia ekzemplo montras, ke severa logikeco ne ĉiam estas glate aplikebla.

Nun pri la adjektivo "korekta" Valo sendube tute pravos. Korekta = korektanta, samkiel interesa = interesanta. Bedaŭrinde, kiu pro hezito sin turnos tiurilate al PIV, trovos ĉe la artikolo "ĝust/a" la teorie analogiajn adjektivojn : justa, ekzakta, prava kaj... (ho ve!) korekta !* En eta samtema traktaĵo, kiu aperis en **Transalpa Esperantisto**, n-ro 16, somero 1985, mi jam atentigis, ke Zamenhof mem foje uzis la ig-havan "paraliziga" (vd. PIV ĉe paraliz/) malgraŭ la evidenta transitiveco de la verbo paralizati. Mi en tiu sama artikoleto rimarkigis, ke "komenca inklino" estas inklino, kiu fakte ne komencas (ion), sed komenciĝas (de si mem).

Kion ni konkludu el ĉio ĉi ? Unue ke esperanto, malgraŭ siaj tre ĝeneralaj precizeco kaj logikeco, tamen ne estas 100-procente preciza kaj logika ; due, ke eĉ tre kompetentaj vortaristoj foje mise vojiras... tute tiel, kiel ĉiu ajn el ni. Valo prave konsilis, ke "ni prenu nian bienon, kie ni ĝin trovas". Ni dume konsciu, ke ne ĉiaj bienoj estas sendistinge prenindaj.

André Gilles

* Same erare en la senco de "neĝusta" ni trovas en PIV ĉe la artikolo "dum" (IV, Rim.3) : Nekorekta kaj nepre evitinda estas la uzado de la adv. dume en la senco de la subjunkcio dum.

PRILINGVAJ KOMENTOJ DE ERGOTO DE BONAERO post legado de L! 65

LANDNOMOJ KAJ POPOLNOMOJ : Mi havas neniun problemon pri ilia uzo. Jen ekzemploj : Francio - FRANCO (Kaj se ne franco, do fremdulo en Francio!) Hispanio - HISPANO, Koreo - KOREANO, Peruo - PERUANO, Ĉilo - ĈILANO, Kolombio - KOLOMBIANO, Anglatero - ANGLO (Kaj por la provinco, sen neceso distordi la nomon : Anglio !), Belgio - BELGO, Meksiko - MEKSIKANO, Meksikurbo - MEKSIKURBANO, Brazilo - BRAZILANO, Brazilja - BRAZILJANO, Pollando - POLO, Svislando - SVISO, ktp. Do, sen la ĝeneraligita IO ĉiuj apartaj problemoj restas solvitaj. Kun malpli da unuformeco kaj pli da varieco, kaj sen neceso distordi naciajn landnomojn. Por fini : Egiptujo : antikva lando ; Egiptio : Moderna lando. Kaj atenton, vi faras gravegan eraron per Esperantio, ĉar ne temas pri "LANDO", sed pri la Ea aŭ E-ista MONDO ! Sekve, la sola ĝusta formo : Esperantujo !

Zamenhofaj vortoj estas tre klaraj : "Oni devas obei nur la LOGIKON", do, se anstataŭ racie, logike kaj analogie uzi la sufikson -(AT)OR-, -SOR- por maŝino aŭ aparato (KOMPRESORO, REFLEKTORO, KOMPUTORO!), oni neracie, nelogike kaj neanalogie misuzas la formon KOMPUTERO (nur ero de komputo, nome, donitaĵo), oni nur talpe, strute aŭ nijandue obeas ne la logikon, sed la erarojn kaj arbitraĵojn de PIV. Sed eraro tamen restas eraro, eĉ se ĝi estas en PIV ! Kaj certe la vorto KOMPUTERO estas tie misdifinita, ĉar tiu difino estas por KOMPUTORO.

"Nur eras la komputo
per simpla komputero,

(El miaj :

sed estas ja atuto

KANTETOJ KARNAVALAJ :) la komputora vero !"

FOR "FAR" ! Ĝi ja ne rajtas prepozicie funkcii. Se vi anstataŭigas ĝin per BLEK vi ekhavas la saman sensencan rezulton ! Jen ekzemploj :

"Artikolo blek ŝia frato". "Tiu novelo estis tradukita blek anonimulo!"

La lanĉinto de FAR prepozicie, fakte lanĉis BLEKON !

Kio estas FARO ? Substantivigita ago. En poezio, FAR kun apostrofo aŭ sen ĝi pluhavas substantivan karakteron. Tial, pli bone, oni vaste ekuzu BLEKON prepozicie kaj oni daŭrigu la BLEKadon !

(Noto de la red. : ERGOTO DE BONAERO efektive sendis amason da tre interesa materialo, el kio mi ĉerpos por aperigi en venontaj numeroj de L! Dankon al tiu ĉi nova kontribuanto !)

PRI SUPERSIGNOJ

"...Sed kial homoj plendas, ke skribmaŝinoj ne havas la supersignojn ?? Afabla meĥanikisto modifis mian skribmaŝinon, eĉ faris la supersignojn el "o" kaj "v" kaj fiksis ilin al klavo (kie antaŭe estis "1/2" kaj "1/4"), kaj faris la klavon "morta" por ke mi povu tajpi la supersignon kaj poste la literon, antaŭ ol la papero moviĝas. Tute kontentiga afero!..."

(El letero de J. Lehane, Aŭstralio)

$$\sqrt{2} = ?$$

El la facile starigebla formulo $(a + b)^2 = a^2 + 2ab + b^2$ oni ĉerpis regulon por ekstrakti kvadratajn radikojn. Tiu regulo estas konata de ĉiu 12/14-jara lernanto en unuagrada lernejo. Ĝin aplikinte, kdo PMG anoncis la valoron 1,414213562... (L: 65). Refarinte la kalkulon, mi agnoskis la ĝustecon de tiu valoro, kaj, per inversa kalkulo, mi konstatis, ke ĝia kvadrato proksimas je 2 kun tre granda precizeco (L: 66). Do por mi ne restas ia dubo. Tion povos ŝanĝi neniu "matematika" akrobataĵo.

VALO

SEN FALSĪRMRETO

Mi dankas al K-do Kribo pro lia piednoto aldonita al mia lasta artikolo "Pro kelkaj dekonoj de milono", kiu atentigis min pri perfingra miskalkulo, kiun la uzado de kalkulatoro estus evitinta al mi, sed kiu ebligas al mi la okazon pli detale paroli pri temo, kiun mi intence plej resumis en tiu artikolo.

Do mi konsentas, ke $\sqrt{2} = 1,41421356237$ anstataŭ 1,416581, sed ne 1,414213562, kiu estas empiria nombro. Cetere, jen la operacio, kiun ĉiu povos kontroli:

2,00	2814228
400	1,414228
11900	
64400	
811600	
24875600	
2361776.	

Krome, tiu miskalkulado mia estas nur akcesora detalo, kaj ŝanĝas nenion pri la konkludo de la temo pritraktita, t.e., ke la kvadratigo de nombroj kaj la kalkulado de diagonaloj estas du malsamaj aferoj, kiujn la matematikistoj verŝajne paŭse konfuzas.

Diri, ke $\sqrt{2} = 1,414228$, signifas, ke kvadrato, kies areo estas 2, havas laterojn kun longeco 1,414228, ne pli, kaj diri, ke $9,905 : 7 = 1,415$, signifas, ke kvadrato kun latero 7 havas diagonalon 9,905, kaj ke la rilato inter ili estas 1,415. Nur necesas ne konfuzi ambaŭ nociojn.

La kaŭzo de tia konfuzado kuŝas en tio, ke la diagonalo de kvadrato, kies areo estas 2, ankaŭ ŝajne estas 2, kio signifas, ke 1,414228 estas ĉu la latero, ĉu la rilato inter si mem kaj la diagonalo. La produto de ĝia kvadratigado estas 2 (areo), kaj la kvociento de 2 (diagonalo) per 1,414228 ankaŭ estas 1,414228. Tiu koincido instigas pensi, ke 1,414228 estas la ĝusta rilato inter la latero kaj la diagonalo de ĉiu kvadrato, se oni ne atentis pri tio, ke la kvadratigado de nombroj ne konsideras la aldonan longecon de la cirkonferenca

rektaĵo "virtualan" en ĉiu cirklo, kaj "efektivan" en ĉiu kvadrato, kies diagonalon ĝi plilongigas.

Praktike, la latero de kvadrato estas la sumo de du maloblikviĝintaj segmentoj de la oklatero strekebla en la cirklo Ci de la formulado pri la cirklokvadrato (L: 59), dum la aldona longeco de la cirkonferenca rektiĝo helpas al la plilongiĝo de la diagonalo, sen kiu la cirkla kvadratiĝo ne eblus.

Konsekvence, rilate al areoj, ĉiu nombro estas apriore konsiderenda, kvazaŭ cirklo kvadratiĝanta. Tio implicas:

1^o - Ke la longeco de kvadrata latero ne povas esti la rilato inter la diagonalo kaj la latero mem, sen konsidero de la aldona longeco de la cirkonferenca rektiĝo lokita en la diagonalon.

2^o - ke, por trovi la ĝustan rilaton, la diagonalon estu ĝuste kalkulita.

Tion ebligas nur la du solvoj de la problemo pri la cirklokvadrato, aritmetika kaj geometria, kiuj konfirmas, kaj precizigas, la ĝustecon de la rilato $9,905 / 7$ inter la hipotenuzo de ortangulo, kies lateroj estas 7, kaj ĝiaj lateroj, kaj ankaŭ rilato inter ĉiu kvadrata latero kaj ties diagonalon.

Konsekvence, la diagonalon de kvadrato kun latero 1,414228, originanta el cirkla areo 2, fakte estas $1,414228 \times 9,905 / 7 = 2,00113262$, kaj ĝia rilato kun ties latero ne estas 1,414228 mem, sed, kompreneble, $2,00113262 : 1,414228 = 1,415$ sen reziduo.

Konklude, la kvadratigo aŭ la progresigado de nombroj povas helpi al la kalkulado de areoj, sed ne al tiu de diagonaloj sen perado de la rilato $9,905 / 7$.

Fina punkto ! La "Serpento" ja mordas sian voston !

Tiuj "akrobata cerbumaĵo" kaj perfingra kalkulado estas plenumitaj de bonvola amato profite al "Aŭgusto".

Do, oni ankaŭ bonvolu aplaudi la "artiston", kaj nepre ne forgesi la propran "kontribuaĵon".

Julo Ŝtrumfo kaj "Aŭgusto" antaŭdankas.

B.G.D.

EFEKTIVA PETO AL D.C.

Kiel ĉiu laŭtulo, mi respondecas nur pri la ideoj, kiujn mi efektive esprimis, kaj tute ne pri la ideoj, pri kiuj aliaj homoj supozas, ke mi devus same opinii. Tial mi petas, ke D.C. bonvolu klarigi al mi, kiu estas la rilato inter la ideoj de sinjoroj Pierre P. Grassé, Albert Vandel kaj Albert Delaunay kaj la ideoj, kiujn mi mem esprimis en "Laŭte".

Por tiuj, kiuj interesiĝas pri la ideoj, kiuj efektive estas miaj (provizore, ĉar, kiel ĉiu homo, mi evoluas), jen du demandoj, pri kiuj mi tute indiferentas:

- kiu gajnos la mondan pokalon de futbalo ?
- ĉu la universo estis kreita de iu dio, aŭ ĉu ĝi estas eterna ?

kaj jen du demandoj, pri kiuj mi (hodiaŭ) plej zorgas:

- ĉu mi sukcesos ekdormi ĉi-vespere malgraŭ la varmecon, kiu nun regas en Strasburgo ?
- ĉu mia grupo de Amnestio Internacia sukcesos decidigi la pakistanaĵn aŭtoritatojn liberigi Imdad Hussain Chandio-n ?



LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ

ĴUS APERIS :

Marie-Thérèse LLOANCY : "Esperanto et jeu de mots dans l'oeuvre de Raymond Schwartz (1894-1973), doktoriga disertaĵo (verkita en la franca lingvo) sub gvidado de Frédéric FRANCOIS, Universitato René-Descartes (Sorbono), Parizo, marto 1985. Fote represita de la Grafika Centro de UEA, kun nur detalaj rearanĝoj plus ĝenerala bibliografio. Ĉiu ekzemplero, bindita, ĉ. 1200 paĝoj (en 2 volumoj) : 150 FF (+ sendokoj : 20 FF). Mendi al : Marie-Thérèse LLOANCY
5 rue Léonard Constant, F 64000 PAU.

Ekzistas resumo (en franca lingvo kaj esperanto) kun ĝenerala bibliografio, 30 paĝoj + bindita koverto, kiun oni povas mendi al la sama adreso kontraŭ 18 FF.

ROUEN (F) : semajnfinaĵo

La Esperanto-Grupo en la Ruena regiono (43 rue Desseaux, F 76100 ROUEN) planas organizi kvar semajnfinojn lingvajn kaj kulturajn. Dato de la unua aranĝo : 29an/30an de NOV. 1986.

Programo : Diversnivelaĵoj pri Esp-o. Gvidataj urbovizitoj. Diskutoj pri la internacia komunikado kaj esperanto.

Loko : La staĝejo situas en urbo ROUEN, Normandio, 120 km for de Parizo. Proksime de Britio kaj Belgio.

Kotizo : 100 FF aŭ 15,5 EKUOJ. 70 FF aŭ 11 EKUOJ por junuloj ĝis 26-a jaro. Manĝoj kaj tranoktado : Malmultekostaj gastejoj kaj restoracioj apud la staĝejo.

Petu la informilon !

ALVOKO POST ĈERNOBIL

26. majo 1986. Kara amiko, unu monato pasis post la eksplodo de Chernobyl-akcidento. Ankaŭ sur Japanion, kiu situas 8000 kilometrojn for de Chernobyl, falis radioaktivaĵo je alta grado. Spite de la aserto de la registaro, multaj japanoj maltrankviliĝis kaj eĉ detenis sin de manĝado de lakto kaj legomo ktp. Sed ni pli zorgadas pri vi, eŭropaj amikoj, kiuj ne povas forflugi for de la landoj. Kie! vi fartas lastatempe ? Pri la akcidento kion vi interparolas kaj prizorgas en ĉiutaga vivo ? Ni elpensis, ke ni kolektos krudajn voĉojn de eŭropanoj pri la akcidento en Esperanto, kaj sciigos ilin al japanoj per E-gazeto aŭ ĝeneralaj japanaj ĵurnaloj.

Do ni alvokas vin, ke vi :

1) sendu al ni koncizan kaj konkretan raporton pri ĝi en via lando, majbaro, laborejo kaj familio, kune kun krudaj voĉoj en maltrankvilo, kolero, kaj aliaj diversaj sentoj.

2) se eblas, aldonu kopiojn de la novaĵoj, kiuj bone informas pri ĝi, kun resuma traduko en Esp. Ankaŭ fotoj, diagramoj, karikaturaj ktp. estas bonvenaj. Se vi volas ne publikigi vian nomon sur la gazetoj, anticipe informu nin pri tio.

Ni esperas vian sanon kaj pacon sur nia tero. Kun saluto
Esperanto-Disvastiga Studgrupo, c/o KINUGASA Hiroŝi, 6-24-503,
Niŝirokugo 4-ĉome, Oota-ku, TOKIO, 144 JAPANIO.

ĈE SAT-BROŜURSERVO

Denove estas disponebla en aparta broŝuro la prelego de André CAUBEL : "LA ZAMENHOFA HOMARANISMO". La nova eldono, 24-paĝa, re-tajpita per "Julia" estas pli klare legebla. Jen nepre diskonigenda dokumento okaze de la venontjara jubileo. Nova prezo : 4 FF.

Du novaj broŝuroj, planitaj por 1987, estas jam prespretaj kaj espereble aperos komence de la venonta jaro - se ne pli frue! La broŝurabonantoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis la broŝurojn de 1986 (VA,PA,NC) ricevos do ilin kune kun

* "La Konflikto" (LE DANTEK/Lanti), kodo : LK, prezo : 20 FF

* "Filozofio Zoologia" (LAMARK/Valo), kodo : FZ, prezo : 20 FF

Notinde, ke fine de "La Konflikto" estos aldonitaj la kelkaj artikoloj de la franca filozofo ALEN (ALAIN) tradukitaj de Lanti, kaj kiuj antaŭe troviĝis en la broŝuro "Por nia medito".

Ekde sept.86 iom plialtiĝas la prezoj de jenaj broŝuroj :

La Aperoĵoj de Ahasvero (Han Riner) Nova prezo : 18 FF.

Argentina Novelaro, 18 FF. Bazoj de Anarkiismo : 18 FF.

Durruti... 3 FF. Esperanto de poĉe, 6 FF. Esp. su 24 pagine (itala), 3 FF. Humanitaristaj principoj (Eugen Relgis), 3 FF.

La Krimoj de Dio (S. Faure), 4 FF. La Kvina Evangelio (Han Riner), 15 FF. La laborista esperantismo (Lanti), 3 FF.

La mistero de nia surtera ekzisto (Archdeacon), 4 FF.

Ĉu militista defendo estas kredebla ? (Lasserre), 6 FF.

Memvola Servuto (La Boétie), 4 FF. Mia vivo (Bartelmes), 10FF

Naciismo kaj Esperantismo (Aarse), 8 FF. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner), 18 FF. El verkoj de Lanti 1.

kaj 2., ĉiu... 20 FF.

Memorige : Estas denove disponebla "Laŭ la fluo de l'interparolo" + "Esprimoj sankciitaj de l'uzado" de L. Bourgois.

Kodo : FI, nova prezo : 8 FF. Mendu pokvante ĉe :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque. P&K: 337174 M Bordeaux.

Vi ĝuos 20%-rabaton.

DEKLARACIO DE LA 59-a SAT-KONGRESO

La 59-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (*), kiu okazis de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1986 en Sant Cugat del Vallès, Hispanio, kun partoprenantoj el 13 landoj, aprobis jenan deklaron.

La kongreso,

pristudinte diversajn aspektojn de la hispana Revolucio, okaze de ties 50-a datreveno, sin deklaras solidara kun tiuj, kiuj daŭrigas la socian batalon sur la bazoj de tiu grava laborista movado, interrompita de la kontraŭrevoluciaj fortoj ;

pristudinte la situacion en Pollando (kies konsekvenco estas i.a. la malpermeso por SAT organizi antaŭviditan kongreson en tiu lando en 1987) sin deklaras solidara kun la rezisto de la plej granda parto de la pola popolo kontraŭ la procezo de "normaligado" ; (**)

alvokas la membrojn partopreni konkrete en subteno al la liberiga batalo kontraŭ la sudafrikaj koloniistoj (bojkotado, manifestacioj...);

opinias, ke civila kaj militista malobeo estas aplikinda kiel batalrimedo kontraŭ socia maljusteco kaj milito ;

ĝojas pri la progresoj en la aplikado de esperanto en scienco, tekniko kaj instruado dum la lastaj jaroj, kaj invitas la organizojn kun internacia agadkampo prikonsideri la uzadon de esperanto, kiu fariĝos centjara en 1987.

(*) SAT, 67 avenue Gambetta, F-75020 PARIS

(**) **normaligado** : klopodoj de la ŝtato por devigi la civitanojn kondukti laŭ normoj, kiujn ĝi fiksas, laŭ kriterioj, kiujn ĝi konsideras "normalaj" (tiu ĉi klarigo estas ĝenerale superflua en naciaj lingvoj).

En 1987, de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto, SAT kongresos en Bulonjo ĉe Maro (Boulogne-sur-Mer), Francio. En 1989, en Weissenhorn (Fed. Germanio). En 1988 aŭ 1990 : aŭ en Campos do Jordao (Brazilo), aŭ en San Marino.

Unua listo de mondonacintoj por la aĉeto de ofsetilo "Aŭgusto" por SAT-Broŝurservo/Laŭte! :

L.A.P. 150 - D.C. 200 - G.L. 200 - P.O. 500 - G.R. 100 - B.G.D. 500 - A.R. 71 - J.S.B. 500 - P.S. 100. Sume : 2321 FF. Plej koran dankon al ĉiuj malavaraj geamikoj !

"Aŭgusto" jam alvenis kaj baldaŭ ekfunkcios por presi la venontajn "laŭte" kaj broŝurojn.

(fino de p.2)

Malsupre, blanka spaco, sur kiu la loka grupo metu per stampilo sian adreson. Disdoni tiujn foliojn en leterskatoloj estus malfacile aŭ multekoste, kaj ne tre efike : ni jam ricevas tiom da forĵetotaj prospektoj ! Ne tre efika estus ankaŭ disdonado sur publikaj lokoj, kiel urbaj bazaroj. Sed okaze de ekspozicio de esperantaĵoj, ni povus stoki la flugfoliojn sur tablo apud la elirejo, kaj enmanigi ilin al ĉiu eliranta vizitinto. El centoj da ili espereble kelkaj estus interesataj.

Mi liveras tiun ĉi ideon, kiu ĝermis en mia kapo de maljunulo. Pli junaj elpensu pli trafajn, pli adaptitajn al la kondiĉoj de la moderna socia vivo. Sed ĉiu cerbumu !

La literaturo bezonas esceptajn talentojn. La propagando bezonas ĉies pripenson kaj ĉies helpon.

VALO

POR E-ADRESAROJ

"Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo estas rekomendinda sed ne deviga". (Punkto n°5 de la oficiala protokolo de la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo 1905)

Kiom ajn multaj estas ĉiuj E-istoj en la mondo, pro la diseco en ordinaraĵoj estas malfacile renkonti ilin.

Ĉu ni atendu ĝis, danke al prozelitismo, la E-istaro estos multe kreskanta ? Kaj ĝis kiam ? Ĉu ni atendu ĝis kelkaj aŭ multaj registaroj trudos la lernadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj, aŭ duagradaĵoj ? La nuntempa sinteno ne estas esperdona !

NE PLU ATENDI. ANTAŬENIRI ! Por faciligi uzadon de Esperanto, ni bezonas **adresarojn**. Adresaro Tutmonda en unu libro estas nebla :

Aŭ la nombro de adresoj estos ege malgranda, nur eta parto de la E-istaro, aŭ ĝi necesigos grandegan laboron, tute maleblan, kaj ĝi konsistos en dikega libro multekosta.

La solvo estas : Starigi adresaron laŭ modelo de telefonadreso. Ĉiu loka E-societo (urba grupo, ktp) enlistigos la konatajn E-istojn. Oni grupigu la rezultatojn de ĉiuj societoj ekzistantaj en la provinco, aldonante la izolulojn. Oni havu adresaron facile kompletan per malmulte da laboro, malmulte koston, maldikan, ktp.

Sufiĉus, ke ĉiu en sia loko agu same, por ke ekestu adresaro por ĉiuj regionoj, landoj, ktp, kie estas E-istoj.

Disponigi, grupigi laŭbezone tiujn adresarojn, estos facile kaj malmulte koste. / **Lucien ANGEVIN**, r. Bernard-Lazare F 30740 LE CAILAR, Francio.

KRUCVORTENIGMO proponata de **Sfinksido** (C.Cavalié)

(s.f.) = sen finaĵo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3			■							
4					■					
5						■		■		
6									■	
7			■							
8					■					
9					■			■		
10			■							
11	■									

Horizontale :

1. - Ŝi ne lasas la virojn okupiĝi pri ŝiaj aferoj (s.f.).
- 2.- Tiel ke la efiko sur la okuloj estas doloriga aŭ malagraba.
- 3.- Sur aŭtomobilo cirkulanta en Tajvano.- Do la nokto malaperis.
- 4.- Rilata al afrika riverego.- Senkompare.
- 5.- Inflamo de la orelo.- Sufikso uzata por derivi numeralojn.
- 6.- Tiu de la Fiŝkaptisto estas en Vatikano.
- 7.- Sufikso.- Verki, vortigi.
- 8.- Nenormala delokiĝo.- Ĝi povas esti sensa aŭ motora (s.f.).
- 9.- Rilata al japana pruno (aŭ abrikoto...)- Cifero.

10. Ĉe la Francoj, la sesa tono.- Ĝi ne allogas la nenifaremulon (s.f.).
11. Prezianta lanugan aspekton, kiel ia frukto.

Vertikale :

- 1.- La aventuremo ne estas lia speciala kapableco.
- 2.- Kun okulvidebla nervozeco.
- 3.- La dek-dua ĉe aliaj.- Tiu de Nacioj malakceptis Esp-on en 1923 (s.f.).- Interjekcio esprimanta plendon.
- 4.- Koncerne la Neandertalan homon, ĝi konsistis el silikaj splitoj kaj ostoj.
- 5.- Poseda adjektivo.- El kio aspektas la maro dum la kalmoj.- Participa sufikso.
- 6.- Intuicio (s.f.).- Sufikso kiu ne preterpasas la familion.- Riverego, en la direkto de oriento.
- 7.- Tabulojn.
- 8.- Parazita dermatozo de la kaphara haŭto (s.f.).- Pli malproksime ol la sepa.- Prefikso.
- 9.- Unu el la ioniaj insuloj, reĝlando de Uliso.- Eksceso, supermezuro (s.f.).
- 10.- Tia injekto igas korporegionon ne plu kapabla sensi.

La venonta numero, espereble **duobla**, aperos fine de novembro kaj enhavos ampleksan literaturan parton (novelojn, poemojn...) kiun ne eblis publikigi en ĉi tiu "simpla" numero. Ĝis baldaŭ !
